

Михаил Лермонтов,

Angelo

tradukita de Vasilij Devjatnin

En mezo de nokto, en blua ĉielo,
 Traflugis kaj kantis plej bela anĝelo.
 Kaj nuboj kaj steloj kaj lun' en irado
 Atentis kun ĝojo je l' sankta kantado.

Li kantis feliĉajn, neniam pekantajn
 Spiritojn, kun Di' en ĉielo loĝantajn;
 Li kantis pri Patro ĉiela kaj tera—
 Kaj lia laŭdado ne estis malvera.

Animon tre junan en brakoj li tenis;
 En mondo malgaja naskiĝi ĝi venis.
 Kaj sono de l' kanto en juna animo
 Restadis sen vort', sed kun viva estimo.

Tre longe en mondo ĝi estis premata,
 Je revo mirinda pri Di' plenigata!
 Kaj ŝanĝi la kanton de l' sankta sincero
 Ne povis por ĝi ĉiuj kantoj de l' tero.

*Traduko de la Rusa poemo “Ангел” de МИХАИЛ ЛЕРМОНТОВ (*1814-10-15 – †1841-07-27) en Esperanton de VASILIJ DEVJATNIN (*1862 – †1938).*

Arg-1039-2114 (2014-06-03 12:21:00)

Pri la tradukinto vidu la vikipediejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Vasilij_Devjatnin.